

9

Indiana Embusko

La brilo de la du fajroj ne transigis sufiĉe longadistance, tial la apaĉoj ne povis nombrigi la kontraŭulojn. La komanĉoj ankoraŭ staris en cirklo, sed tiu tuj estis disrompata kaj disŝirata je ambaŭ flankoj. Pafoj krakis, lancoj flugis, sagoj susuris, tranĉiloj briletis. Krome la vokego de la du kontraŭulaj partioj kaj la aspekto de la ĥaoso de malhelaj, interbatalantaj homoj, kiuj aspektis kiel furiozaj diabloj! Antaŭ ĉiuj apaĉoj estis unu, kiu iĝis tra la komanĉaro kun eksternorma ŝtormforto. En la maldekstra mano li havis revolveron, kaj en la dekstra la levitan tomahokon. Dum ĉiu kuglo el la eta pulvopafilo terenpafis komanĉon per certeco, la milithakilo rapidis kiel fulmo de kapo al kapo. Li ne surhavis rangosignon, ankaŭ lia vizaĝo ne estis ŝminkita. Ni povis vidi ĝin klare. Sed jam la maniero, kiel li batalis, kaj la fakto, ke li havis revolveron, lasis diveni, kiu li estis. La Blanka Kastoro ekkonis lin same rapide kiel ni.

„Winnetou!“ li vokis. „Finfine ni renkontas! Ojo-koltsa okupiĝos pri li.“

La komanĉo saltis for de ni kaj en la batalan ĥaoson. La amaso kuniĝis tiel dense malantaŭ li, ke ni ne povis sekvi lin per la okuloj.

„Kion ni faru?“ mi demandis al Old Death. La apaĉoj estas malpli multaj. Se ili ne baldaŭ reeniĝos, ili estos venkitaj. Ni iru jen pro elbati Winnetoun!“

Mi volis ekiri. Sed la maljunulo ekprenis mian brakon kaj retenis min.

„Ne faru stultajon! Ni ne devas agi perfide kontraŭ la komanĉoj, ĉar ni fumis la kalumeton kun ili. Cetere Winnetou ne bezonas Vian helpon; li estas mem sufiĉe saĝe. Vi ja aŭdas ĝin.“

Fakte mi aŭdis la voĉon de mia ruĝa amiko:

„Ni estas trompitaĵ! Rapide cedu reen! For, for!“

La fajroj estis preskaŭ piedbate estingitaj dum la mallonga, sed ega batalo; sed ili

ankoraŭ lumigis la ĉirkaŭon, tiel ke mi povis vidi, kio okazis. La apaĉoj reencedis. Winnetou ekkonis, ke multe pli granda nombro estis kontraŭ li. Mi miris, ke li antaŭe, tute kontraŭ lia kutima maniero, ne estis esplorinta pli detale pro nombri la kontraŭulojn. Sed la kaŭzon de tio mi baldaŭ poste eksciis.

La komanĉoj volis sekvokuri, sed estis malhelpataj je tio per la kugloj kaj sagoj de la apaĉoj. Speciale ofte mi aŭdis dum tio la krakon de la argentopafilo de Winnetou, kiun li konate ja heredis de sia patro. La Blanka Kastoro lasis la fajrojn rebruligi, tiel ke ĝi pliheliĝis, kaj venis al ni.

„La apaĉoj sukcesis fuĝi. Sed morgaŭ tre frue ni persekutos kaj neigos ilin.“

„Ĉu vi pensas, ke vi sukcesos tion?“ Old Death respondis.

„Certe! Ĉu mia frato do pensis alimaniere kiel Ojo-koltsa? Tiukaze li eraras.“

„Ĉu vi ne diris ankaŭ antaŭe, kiam mi avertis vin, ke mi eraris? Mi nomis tiun valon embuskilon. Eble ĝi estos neebla al vi forlasi ĝin.“

„Nur atendu ĝis la mateno aperos, tiam ni vidos la malmultajn malamikojn, kiuj restis, kaj ni rapide neigos ilin. Nun ili estas savataj per la malhelo.“

„Tial ĝi ja nenecesas pafi al ili! Se vi estos pafintaj ĉiujn viajn sagojn, la valo ja donos sufiĉe da ligno al vi pro fari novajn; sed ĉu vi ankaŭ havas ferpintojn pro tio? Ne malŝparu viajn defendilojn! Kaj kio pri la dek komanĉoj, kiuj gardas la enirejon de la valo? Ĉu ili ankoraŭ troviĝas tie?“

„Ne, ili estas tie ĉi. La batalo allogis ilin.“

„Do tuj sendu ilin reen tien, proke almenaŭ la recediĝo eblos!“

„La zorgo de mia frato ne necesas. La apaĉoj fuĝis tra la elirejo. Sed neniu povas atingi la enirejon.“

„Kaj tamen mi konsilas al vi fari kion mi proponis. La dek viroj tie ĉi ne utilas al vi; sed tie ili estas ege bezonataj.“

La ĉefo faris, kion la maljunulo diris, certe plie per respekto pri Old Death ol per konvinkigo. Sed baldaŭ videbliĝis, kiel tree la maljunulo estis pravinta; ĉar kiam la dek viroj forestis, du pafoj krakis de la enirejo de la valo, al kiu respondis laŭta kriado. Kelkajn minutojn poste du el la dek revenis pro anonci, ke ili estis akceptitaj per du kugloj kaj multaj sagoj. Nur ili du povis saviĝi.

„Nu, ĉu mi eraris?“ la *scout* demandis. „La kaptilo estas fermita antaŭe kaj malantaŭe, kaj ni estas en ĝi.“

La Blanka Kastoro estis konsternita.

„Uf! Kion Ojo-koltsa faru?“

„Ne malŝparu la forton kaj la armilojn de viaj anoj! Surpostenigu po dudek aŭ tridek ĉe la elirejoj de la valo, pro gardadi tiujn du punktojn. La aliaj homoj reencediĝu pro resti, proke ili havos freŝajn fortojn morgaŭ frue. Tio estas la sola, kaj certe ankaŭ la plej bona aĵo, kiun oni povas konsili al vi.“

Tiufoje la ĉefo tuj agis laŭ la konsilo. Tiam ni nombrigis la mortigitojn, kaj nur nun mi repensis pri la blankuloj. Nur la mortaj kuŝis tie; la aliaj estis for. Kun la oficiro, Gibson kaj William Ohlert mankis ĵus dek viroj. Ankaŭ la du topioj estis malaperintaj.

„Tio malbonas!“ mi ĝemis. „Tiuj uloj saviĝis al la apaĉoj.“

„Jes, kaj ili estis bone akceptitaj ĉe ili, ĉar ili estis je la flanko de la du esploristoj, la du memdeklaritaj topioj“, Old Death kapskuis.

„Do ni refoje perdis Gibson:on kaj Ohlert:on!“

„Ne“, la maljunulo kontraŭis. „Ni havas la totemon de la Bona Viro, kaj la apaĉoj konas min; do ili akceptos nin kiel amikoj. Tiam mi ja iel sukcesos, ke la du estos donataj al ni. Ni perdas unu tagon, estas ĉio.“

„Sed kio, se la du foriĝos kaj malaperiĝos?“

„Tion mi ne kredas. Ili devus iri laŭlarĝe trans la Mapimi, kaj tion ili ne povas riski sole — sed vidu, kio estas tio?“

Grupo de komanĉoj staris kune. El ĝia mezo sonis ĝemo kaj veplendo. Ni aliris, kaj vidis unu el la blankuloj, kiu estis sveninta per ega lezo, kaj ĵus rekonsciiĝis. Li estis ricevinta lancopikon tra la subventro, de malantaŭe, do de komanĉo. Tio certe okazis, kiam la blankuloj estis atakintaj nin.

Old Death surgenuiĝis ĉe li, kaj ekzamenis lian vundon.

„Viro“, li diris, „ĉu Vi estis je la flanko de la apaĉoj?“

„Jes“, la demandito ĝemetis.

„Vi sciis, ke ni devis esti atakataj ĉi nokte, ĉu?“

„Jes, la du laŭdiraj topioj kondukis la komanĉojn tien ĉi per tiu intenco.“

„Kaj Gavilano devis doni la signon per la fajro, ĉu?“

„Jes, *Sir*. Fakte li devis puŝi en la fajron tiel ofte, kiel cent da komanĉoj ĉeestis. Se Gavilano ne estus ĉesigita dum tio, Winnetou estus atakonta la malamikojn nur morgaŭ je alia loko, ĉar li hodiaŭ kunhavis nur cent virojn. Sed morgaŭ la aliaj venos al li.“

„Tion mi pensis. Ke mi malhelpis al Gavilano puŝi kvar fojojn en la fajron plu, igis la apaĉojn ataki nin jam nun. Sed nun ili okupis la du elirejojn. Ni ne povas foriri, kaj morgaŭ tio valo estiĝos malferma tombo al ni.“

„Ni defendiĝos“, la ĉefo, kiu kunstaris, grumblis kolerigite. „Sed tiu perfidisto iru al la Ĉiamaj Ĉasejoj kiel fava hundo, pro tie esti ĉasata de la lupoj, ĝis la bavo fluas el lia buŝo.“

Li ekprenis sian tranĉilon, kaj puŝis ĝin en la koron de la vundito.

„Malruzaĵo!“ Old Death vokis kolere. „Vi ne devis estiĝi lia murdanto.“

„Ojo-koltsa mortigis lin, kaj nun lia animo estas la sklavo de lia. Sed ni nun interkonsilu. La militistoj de la komanĉoj ne volas atendi, ĝis la apaĉaj hundoj venos amase tien ĉi. Ni povas ŝtormi tra la eliro jam ĉi nokte!“

Li sidiĝis kun siaj subĉefoj ĉe la fajro.

Old Death ankaŭ devis partopreni en la interkonsilado. Mi sidis kun Lange, lia filo kaj la negro tiel malproksime de tie, ke mi ne povis kompreni ion, ĉar la debato estis farata kun mallaŭtigataj voĉoj. Sed mi ekkonis per la mienoj kaj la viglaj gestoj de la *scout*, ke li ne havas la saman opinion kiel la indianoj. Li ŝajne fervore defendis sian opinion, sed sen sukceso. Finfine li salte ekstaris, kaj mi aŭdis lin diri:

„Nu, do kuru en vian pereon! Mi jam ripete avertis vin, sen esti aŭdata. Mi ĉiam estis pravinta, kaj pravos ankaŭ tiun fojon. Faru, kion vi volas! Sed mi kaj miaj kunuloj, ni restos tie ĉi!“

„Ĉu la palvizaĝo tro malkuraĝemas pro batali kune kun ni?“ unu el la subĉefoj demandis.

Old Death faris fortan movon al li, kaj volis doni drakonan respondon al li, sed ekhezitis kaj diris trankvile:

„Mia frato unue pruvu sian kuraĝemon, antaŭ li rajtas demandi pri la mia. Mia nomo estas Koŝa-pehve, tio sufiĉas.“

Li venis al ni, kaj sidiĝis, dum la ruĝuloj interkonsilis kelkan tempon plu. Finfine ili estis findecidintaj, kaj stariĝis de iliaj sidlokoj. Tiam eksonis laŭta voĉo trans la valo:

„La Blanka Kastoro vidu tien ĉi! Mia pafilo sopiras al li.“

Ĉies okuloj turniĝis al la loko, de kie tiuj vortoj estis sonintaj. Tie staris Winnetou, malhela ombro antaŭ la helkolora rokmuro, nur ete lumigita de la fajroj en la valo, alte rektiĝita, kun alŝultrigita pafilo. La du tuboj ekfulmis unu post la alia. La Blanka Kastoro falis trafite sur la teron, kaj flanke de li unu el la subĉefoj.

„Tiel ekmortos ĉiuj mensogistoj kaj perfidistoj!“ ĝi ankoraŭ sonis. Tiam la apaĉo estis malaperinta.

Tio ĉio estis okaziginta tiel rapide, ke la komanĉoj eĉ ne havis la tempon ekstari. Sed nun ili ĉiuj salte stariĝis, kaj kuregis al la loko, kie Winnetou estis malaperinta. Nur ni kvin restis tie. Old Death paŝis al la du ĉefoj. Ili mortis.

„Kia riskaĵo!“ Lange vokis. „Tiu Winnetou vere estas kuraĝega!“

„*Pshaw!*“ Old Death ridis. „La vera aĵo ankoraŭ estas venonta. Atentu!“

Apenaŭ li estis dirinta tion, ni aŭdis orelŝirantan kriadon.

„Jen ĝi!“ li diris. Winnetou ne nur punis la du estrojn pro la perfidemo de ilia popolo, sed eĉ logis la komanĉojn en la ejon de liaj anoj. La sagoj de la apaĉoj postulos iliajn oferojn. Aŭskultu!“

La akra, malforta krakado de revolveraj pafoj estis aŭdebla, tri-, kvin-, okfoje unu post la alia.

„Estas Winnetou“, Old Death diris. „Li uzas siajn revolverojn. Mi kredas, ke li troviĝas meze inter la komanĉoj, senke ili povas esti ĝi danĝeraj al li!“

Tiuj okazaĵoj estis io ĉiutaga al la maljuna *scout*. Lia mieno estis tiel trankvile, kvazaŭ li rigardus dramon, kies scenaron kaj finon li jam konis. La komanĉoj revenis, ĉar ili ne estis sukcesintaj ekkapti Winnetou:n. Anstataŭ ili kunportis kelkajn el iliaj kunuloj, kiuj estis aŭ mortaj aŭ lezitaj. Dum tio blankuloj certe estus konduktintaj trankvile kaj per konsterno kaj ankaŭ per saĝeco. Sed la ruĝuloj kriis kaj vokegis, kaj dancis ĉirkaŭ la mortuloj kaj svingis iliajn milithakilojn.

„Se mi estus tiuj komanĉoj, mi estingigus la fajrojn kaj kondukus trankvile“, Old Death komentis. „Ili hurlas iliajn proprajn funebrokanon.“

„Kio nu estis decidita per la militista interkonsilado?“ Lange demandis.

„Tuj ŝtormi okcidenten.“

„Kia stultaĵo! Tiukaze ili ja ĵus kuris renkonte al la apaĉoj, kiuj venas tien ĉi.“

„Ne rekte tio, *Sir*, ĉar ili simple ne sukcesos elveni. Kaj fakte, se ili sukcesus, Winnetou estus malantaŭ ili, kaj la apaĉoj, kiun li atendas, antaŭ ili. Ili do troviĝus inter du kontraŭuloj, kaj estus pereontaj. Sed ili kredas, ke la apaĉoj estas malmultaj kaj estas

konvinkitaj, ke ili povas venki la malamikojn. Krome ili scias, ke la filo de la Blanka Kastoro kun sia grupo, kiun ni renkontis, alvenos; tio duobligas ilian esperon. Nun ili eĉ ardos per fervoro venĝi la ekmortigon de iliaj du ĉefoj. Sed ili almenaŭ atendu la matenon, kaj tiam ŝtormi malantaŭen, de kie ni venis tien ĉi. Dum la tago oni vidas la malamikon kaj la barojn, kiujn li pretigas. Sed mia konsilo ne estis akceptita. Entute povas esti egala al ni, kion ili faras. Ni ne kunagos.“

„La komanĉoj pensos tre malbone pri tio.“

„Mi ne povas ŝanĝi tion. Old Death ne emas endanĝeri sian kapon sen neceso. — Aŭskultu! Kio estis tio?“

La komanĉoj ankoraŭ kriis, tielke oni ne povis ekkoni, kia estis la sono, kiun ni ĵus aŭdis.

„Tiu stultulo!“ Old Death koleriĝis. „Winnetou certe estas la viro, kiu utiligos la nenecesan bruon, kiun ili tie kaŭzas. Eble li faligas arbojn, pro bari la eliron; ĉar ĝi ĵus sonis kiel la krako kaj frapado de falanta arbo. Mi volus veti, ke neniu el la komanĉoj travivos tion. Teruriga, sed justa puno, ke ili atakis nesciantajn indianloĝejojn meze en la paco, kaj eĉ murdis la legatojn dum la intertraktado en Fort Inge. Se Winnetou sukcesos malfermi la elirejojn, li povos reenigi siajn anojn, kunigi la superforton tie ĉi en la valo, kaj ataki la sengardiĝantojn de malantaŭe. Mi taksas, ke li faros tion senhezite.“

Finfine la ĝisnuna funebrokriado estis je la fino, kaj la komanĉoj kondukis silente, kuniĝis, kaj akceptis la ordonojn de la subĉefo, kiu nun transprenis la estrecon.

„La *indsman*-oj ŝajne volas ekiri nun“, Old Death diris. „Ni iru al niaj ĉevaloj, proke ili ne fiage konprenos ilin. *Mr. Lange*, iru kun *Via* filo kaj *Hektor* pro venigi ilin! Ni restas tie ĉi; m'taksas, ke la nova estro nun faros etan paroladon.“

Li pravis. Kiam la aliaj tri forestis, la nuna ĉefo venis al ni per malrapidaj paŝoj.

„La palvizaĝoj sidas trankvile sur la tero, dum la komanĉoj iras al iliaj ĉevaloj. Kial ili ne ankaŭ stariĝas?“

„Ĉar ni ne jam eksciis, kion la komanĉoj decidis.“

„Ni forlasos la valon.“

„Vi ne sukcesos eliri.“

„Old Death estas kiel kampokorvo, kies voĉo anoncas malbonon. La komanĉoj rajdos ĉion surteren, kio baras ilian vojon.“

„Ili terenrajdos nenion, sed nur ili mem. Ni sed restos tie ĉi.“

„Ĉu Old Death ne estas nia amiko? Ĉu li ne fumis la pipon de la paco kun ni? Ĉu li ne estas devigita batali je nia flanko? La palvizaĝoj estas bravaj militistoj. Ili akompanos nin kaj poziciuĝos je nia pinto.“

„Tio ja plaĉus al vi! La palvizaĝoj rajdu antaŭe, pro fari la vojon al la komanĉoj kaj pereji dum tio. Ni estas amikoj de la komanĉoj, sed ni ne obeu al iliaj ĉefoj. Ni helpas al niaj amikoj dum ĉiu batalado, kiu estas estrata per prudento kaj pripenso; sed ni ne partoprenas en plano, pri kiu ni jam antaŭe scias, ke ili malsukcesos.“

„Do la blankuloj ne kunrajdos, ĉu? Ni estis pensintaj, ke ili estus bravaj militistoj.“

„Ni estas. Sed ni estas ankaŭ gardiĝaj. Cetere ni estas la gastoj de la komanĉoj. Kiam ĝi ekestiĝis la kutimo ĉe ili, ke ili poziciuĝas iliajn gastojn, kiujn ili ja gardu, ĵus tien, kie

la ekmorto estas neevitebla? Mia frato estas ruza, sed ni ne estas stultaj. Ankaŭ mia frato estas brava militisto, do mi estas konvinkita, ke li rajdos antaŭ siaj anoj, ĉar tio estas la pozicio, kie li estu.“

La ruĝulo estis embarasita. Lia intenco oferi nin pro savi sin mem, estis senhonta. Kiam li vidis, ke tio ne sukcesis per Old Death, li koleriĝis. Lia ĝis tiam trankvila sono plirigidiĝis.

„Kion faros la palvizaĝoj, kiam la komanĉoj forestos? Ĉu ili do aliĝos al la apaĉoj?“

„Kiel tiu estus ebla, ĉar mia frato ja volas neigi la apaĉojn! Ja tute neniom apaĉoj restos, al kiuj ni povus aliĝi!“

„Sed venos kromaj. La komanĉoj ne povas toleri, ke la palvizaĝoj restas tie ĉi. Ili devas kuniri for.“

„Mi jam diris, ke ni restos.“

„Se la blankuloj ne iros kun ni, ni pensu, ke ili estas niaj malamikoj.“

„Kaj kiam la ruĝuloj pensas, ke ni estas iliaj malamikoj, ni ankaŭ traktos ilin kiel malamikojn.“

„Ni ne donos iliajn ĉevalojn al ili.“

„Ni jam prenis ilin. Jen ili estas ĵus alvenigataj.“

Niaj amikoj estis alvenantaj kun niaj bestoj. La estro sinistre kunigis la brovojn.

„Do la blankuloj jam estis farintaj iliajn pretigojn. Mi vidas, ke iliaj mensoj estas malamikecaj kontraŭ ni, kaj mi lasos aresti ilin per miaj militistoj.“

La *sout* elpuŝis mallongan, sinistre sonantan ridon.

„La estro de la komanĉoj eraras pri ni. Mi diris al la Blanka Kastoro, ke ni restos tie ĉi. Kiam ni nun efikiĝos tiun decidon, ĝi enhavas eĉ ne la plej etan nuancon de malamikecon kontraŭ la komanĉoj. Do ne ekzistas kaŭzo pro aresti nin.“

„Tamen ni faros tion, se la blankuloj ne promesos rajdi kun ni kaj poziciigi je nia pinto.“

La vido de Old Death ekzamene migris ĉirkaŭen. Sur lia vizaĝo aperis tiu rikano, kiu ĉiam aperis, kiam li estis plananta fari petolaĵon al iu. Ni tri staris ĉe la fajro. Malmultajn paŝojn for de ni staris la aliaj kun la ĉevaloj. Neniu el la komanĉoj estis en la proksimo. Ili ĉiuj estis irintaj al iliaj ĉevaloj. Old Death diris en la germana lingvo, tielke la komanĉoj ne povis kompreni liajn vortojn:

„Kiam mi terenbatas lin, rapide iĝu sur la ĉevalojn, kaj sekvu min, al la enirejo de la valo, ĉar la komanĉoj troviĝas sur la alia flanko!“

„Mia frato ne parolu en tiu lingvo!“ la estro ĉagreniĝis. „La ĉefo volas scii, kion li diris al siaj kunuloj.“

„La ĉefo tuj eksciu tion. Vi ripete estis malatentinta mian konsilon hodiaŭ, kaj eĉ ne pli saĝiĝis per la konsekvenca damaĝo. Ĉu vi pensas, ke Old Death permesus, ke li lasus sin devigi fari ion, kion li decidis nefari? Mi diras al vi, ke mi timas nek antaŭ ni nek antaŭ ĉiuj viaj komanĉoj. Vi volas aresti nin, ĉu? Nu ĉu vi ne rimarkas, ke vi estas sub mia forto? Vidu al tiu armilo! Nur unu eta movo, kaj mi pafos vin teren!“

La *scout* tenis sian revolveron al li. La estro, kiu nun nomis sin mem ĉefo, volis ekpreni sian tranĉilon, sed tuj la armilo de Old Death estis metita sur la bruston.

„For la manon!“ la maljunulo tondris al li. La komanĉo mallevis la manon.

„Nu!“ Old Death pluis. „Vi montriĝas kiel malamiko, kaj mi donos kuglon al vi, se vi ne tuj ekobeos al mi!“

La ŝminkita vizaĝo de la ruĝulo moviĝis. Esploro li vidis ĉirkaŭen, sed Old Death komentis:

„Ne serĉu helpon je viaj viroj! Eĉ se ili troviĝus tie ĉi, mi pafus vin teren. Viaj pensoj estas tiel malfortaj kiel tiuj de maljuna virino, kies cerbo estas sekiĝinta. Vi estas embuskata de kontraŭuloj, de kiuj vi certe estos venkataj, sed tamen vi kreas novajn malamikojn kontraŭ vi, kiuj estas eĉ pli timindaj ol la apaĉoj. Kiel ni estas armitaj, ni terenpafos centojn da vi, antaŭ nur unu sago povos atingi nin. Se vi volas konduki viajn anojn perforte en la morton, faru tion! Sed al ni viaj ordonoj ne valoras.“

La indiano jen staris silente kelkan tempon. Tiam li diris: „Mia frato pripensu, ke miaj vortoj ne estis tiel intencitaj, kiel ili estis dirataj.“

„Mi komprenas viajn vortojn, kiel ili estis diritaj.“

„Formetu vian armilon, ni restu amikoj!“

„Jes, ni povas. Sed antaŭ mi formetos mian armilon de via brusto, mi estu certe, ke vi seriozas pri via amikeco.“

„La ĉefo ĝin diris, kaj liaj vortoj valoras.“

„Kaj ĵus vi diris, ke viaj vortoj sonas alie, kiel ili estis intencitaj. Do oni ne povas fidi pri promeso de vi.“

„Se vi ne kredas al la ĉefo de la komanĉoj, li ne povos doni al vi kroman certecon.“

„Sed jes! mi postulas de vi, ke vi donas al mi vian pacopipon kaj —“

„Uf!“ la indiano vokis timigite. „Oni ne fordonas la kalumeton.“

„Kaj mi eĉ ne jam kontentiĝos pri tio. Mi volas ne nur vian kalumeton, sed ankaŭ vian medicinon.“

„Uf, uf, uf! Tio neblas!“

„Vi donu al mi tiujn aĵojn ne por ĉiam. En la momento, en kiu ni pace disiros, vi rehavu ilin.“

„Neniu indiano fordonas sian medicinsaketon!“

„Kaj tamen mi postulas tion. Mi konas viajn kutimojn. Kiam mi havas vian kalumeton kaj vian medicinon, mi estas kiel vi mem, kaj ĉiu malamikaĵo kontraŭ ni nebligus la ĝojojn de la Ĉiamaj Ĉasejoj.“

„Kaj la ĉefo ne fordonos ilin!“

„Nu, tiukaze ni estas je la fino. Mi nun pafos vin teren, kaj tiam prenos vian skalpon, tiel ke vi estos mia sklavo post via ekmorto. Pro lasi tempreston al vi, mi levos mian manon tri fojojn. Je la tria fojo mi pafos, se vi ne obeas al mi.“

Old Death levis sian manon unuan fojon, duan fojon, dum li ankoraŭ direktis sian revolveron al la brusto de la ruĝulo. La tria manmovo jam estis preskaŭ finigita, kiam la indiano diris:

„Atendu! Ĉu la palvizaĝo redonos ilin ambaŭ?“

„Jes.“

„Tiukaze Koŝa-pehve havu, kion li postulas.“

Li volis ekpreni la medicinsaketon kaj la pipon, kiuj ambaŭ pendis de ŝnuro ĉirkaŭ lia kolo.

„Haltu!“ Old Death ĉesigis lin. Mallevu la manojn, aŭ mi pafos! Mi fidis pri vi nur tiam, kiam mi fakte havas la du aĵojn. Mia kunulo prenu ilin de via kolo, kaj pendigu ilin ĉirkaŭ mia.

La komanĉo remallevis la manojn. Mi deprenis liajn aĵojn kaj metis ilin ĉirkaŭ la kolo de Old Death, post kio la maljunulo maletendis la streĉitan brakon kun la revolvero.

„Nu!“ li deklaris. „Nun ni reestas amikoj, kaj mia frato nun faru, kion li volas. Ni restos tie ĉi pro atendi, kiel la batalo finiĝos.“

La ruĝuloj preskaŭ ne povis regi sian koleron. Lia mano iĝis al la tranĉilo, sed li tamen ne riskis elzoniĝi ĝin. Li nur vidis al ni kolerarde.

„La palvizaĝoj nun certas, ke nenio danĝera okazos al ili, sed tuj kiam ili estos redonintaj la kalumeton kaj la medicinon, estos malamikeco inter ili kaj ni, ĝis ili estos ekmortiĝintaj sur la torturofosto!“

Li deturniĝis kaj forhastis.

„Intertempe ni estas en saveco“, la *scout* diris. „Tamen ni ne neglektu ian gardiĝaĵon. Ni ne restu tie ĉi ĉe la fajro, sed retenigu al la rando de la valo, kaj rigardu tie trankvile, kio nun okazigos. Venu, *mes'sur*-oj, kaj kunprenu la ĉevalojn!“

Ĉiu ekprenis la kondukilon de lia ĉevalo. Tiel ni iris en la malantaŭan parton de la valo, kie ni fiksligis la ĉevalojn, kaj sidiĝis sub la arboj. La fajro brilis de la forlasita restejo. Ĉie ĉirkaŭe estis silento.

„Ni finatendu la aferon“, la *scout* diris. „M'taksas, ke la danco baldaŭ komencos. La komanĉoj ekŝtormos kun infera kriado, sed pli ol kelkaj el ili eksonigos la voĉon la lastan fojon. Jen — jen vi jam ĝin aŭdas!“

La kriado, pri kiu li estis parolinta eksonis, kvazaŭ aro de sovaĝaj bestoj estus lozigitaj.

La rokmuroj redonis la militkriadon per multobligita forto. Same la ĉĥo ripetis la du pafojn, kiuj nun krakis.

„Tio reestas la argentpafilo de Winnetou“, la *scout* deklaris, „certa signo, ke la komanĉoj estas malhelpataj.“

Se pafataj sagoj kaj ĵetataj lancoj povus kaŭzi sonon, la valo nun certe estus plenigita per sovaĝa bruego. Sed tiel ni nur aŭdis la voĉojn de la komanĉoj kaj la daŭrigatajn pafojn de Winnetou. Tio daŭris certe du minutojn. Tiam karno- kaj ostottrairanta „*Iviviivivivi*“ eksonis.

„Ca esas apaĉi!“ Hektor ĝojkriis. „Ili vinkis e retrobatis komanĉi!“

Li ĉiukaze pravis, ĉar kiam tiu venkokriado estis ĉesinta, ekregis silento, kaj je la sama tempo ni vidis figurojn de rajdantoj aperi ĉe la fajro, al kiuj kunigis ĉiam pli. Estis la komanĉoj. La traŝtormo ne estis sukcesinta. Kelkan tempon estis granda konfuzo ĉe la fajro. Ni rigardis, kiel estis alportataj homoj, kiuj estis aŭ mortaj aŭ lezitaj, kaj la plendokriado ekkomencis denove. Old Death ŝanceliĝis jen kaj reen je sia sidloko per kolero, kaj insultis pri la neprudenteco de la komanĉoj. Nur unu aĵon li komentis koncize, tion, ke ili forsendis grupojn kiel postenuloj en la direkton de la elirejo, ĉar tio estis tre necesa gardiĝorimedo. Kiam la plendokriado ĉesis post mallonga tempo, la

komanĉoj ŝajne sidiĝis pro interkonsilado. Ekde tiam pasiĝis ĉirkaŭ duona horo. Tiam ni vidis kelkajn militistojn foriĝi de la restejo, kaj disiri el la direkton de la malantaŭa parto de la valo, kie ni troviĝis.

„Nun ni estas serĉataj“, Old Death komentis. „Ili do komprenis, kian stultaĵon ili estas farintaj, kaj nun ne plu estos tro fiere aŭdi nian konsilon.“

Unu el la mesaĝistoj venis en nian proksimecon. Old Death mallaŭte tuis. La viro aŭdis ĝin kaj alpaŝis.

„Ĉu la palvizaĝoj estas tie ĉi?“ li demandis. „Ili venu al la fajro.“

„Kiu sendis vin?“

„La nova ĉefo.“

„Kion ni faru tie?“

„Estu farata interkonsilado, en kiu la palvizaĝoj rajtas partopreni.“

„Ĉu rajtas? Kiel bonkore de vi! Do ĉu ni finfine nun sufiĉe valoras esti aŭdataj de la saĝaj militistoj de la komanĉoj? Ni sidas tie ĉi pro restadi. Ni volas dormi. Diru tion al la ĉefo! Via malamikeco kun la apaĉoj nun estas egala al ni.“

La ruĝulo nun petis. Tio ne restis senkonsekvencan ĉe la bonkora maljunulo, ĉar li diris:

„Nu bone, se vi ne trovas vojon de saviĝo sen nia konsilo, vi havu ĝin. Sed ne plaĉas al ni, ke ni akceptu ordonojn de via nova ĉefo. Anoncu al li, ke li venu al ni, kiam li volas paroli kun ni!“

„Tion li ne faros, ĉar li estas ĉefo.“

„Aŭskultu, homo, mi estas multe pli alta kaj fama ĉefo kiel li. Mi eĉ ne konas lian nomon.“

„Li ankaŭ ne povas veni, eĉ se li volus, ĉar li estas lezita je la brako.“

„Ekde kiam la militistoj de la komanĉoj ne plu iras per la kruroj, sed per la brakoj? Se li ne volas veni al ni, li restu kie li estas. Ni ne bezonas lin!“

Tio estis dirata tiel decidite, ke la ruĝulo eĉ pli moderiĝis:

„La komanĉoj transdonos la vortojn de Old Death al la ĉefo. Eble li tamen venos.“

La viro foriĝis. Ni vidis lin iri al la rondo de la militistoj ĉe la fajro. Kelka tempo pasiĝis, antaŭ io okazis. Finfine ni rimarkis, ke figuro en la mezo de la sidantoj leviĝis kaj venis al ni. Estis la nova ĉefo, de kiu Old Death estis preninta tabakpipon kaj medicinsaketon.

„Ha!“ Old Death komentis. „Li do fakte iĝis de sia trono pro paroli kun ni.“

Kiam la ĉefo proksimiĝis, ni ekkonis, ke li havis sian maldekstran brakon en rimeno. La loko, je kiu ni troviĝis, ŝajne estis tre detale priskribita al li, ĉar li venis rekte al ĝi, kaj ekstaris tie antaŭ ni. Li certe estis ekspektinta esti alparolata. Sed Old Death ne moviĝis kaj silentis. Ni aliaj agis same.

„Mia blanka frato lasis peti min veni al li, ĉu?“ la ruĝulo nun jes demandis.

„Ne necesas al Old Death, ke li petu. Vi volis paroli kun mi. Do estis vi, kiu petis. Sed nun mi volas plej ĝentile peti vin diri vian nomon al mi. Mi ne jam konas ĝin.“

„Ĝi estas konata en la tuta prerio. Mi estas nomata la „Saltanta Cervo““.

„Mi estis sur ĉiuj prerioj, kaj tamen ne aŭdis tiun nomon. Verŝajne vi estis kaŝinta ĝin, kaj ne diris ĝin al ajn ĉiuj. Sed nun, kiam vi estis dirinta ĝin al mi, mi permesas al vi sidiĝi ĉe ni.“

La ĉefo faris paŝon reen. Li ne volis lasi permesi ion al si; sed li tamen sentis, ke la cirkonstancoj devigis lin cedi. Tial li surteriĝis malrapide kaj digne antaŭ Old Death, kaj nur nun ni iĝis en sidantan pozicion. Se la komanĉo estis ekspektinta, ke la *scout* estus komencinta la interparolon, li estis erarinta. La maljunulo daŭrigis sian silenton, kaj la ruĝulo devis komenci.

„La militistoj de la komanĉoj volas fari grandan interkonsiladon, kaj la palvizaĝoj partoprenu en ĝi, proke ni aŭdas ilian konsilon.“

„Tio ne necesas. Vi estis aŭdintaj mian konsilon jam ofte, kaj tamen ne atentigis pri ĝi. Sed mi estas kutimita, ke oni atentigas pri miaj vortoj, kaj tial mi ne elparolos miajn pensojn ekde nun.“

„Ĉu mia frato ne volas pripensi, ke ni bezonas lian spertecon?“

„Ha, finfine! Ĉu la apaĉoj montris al vi, ke Old Death estas pli saĝa ol kvincent komanĉoj? Kiu estis la rezulto de via atako?“

„Ni ne povis iri tra la elirejo, ĉar ĝi estis barita per ŝtonoj, arbedaĵoj kaj arboj.“

„Mi antaŭsciis tion! La apaĉoj faligis la arbojn per iliaj tomahokoj, kaj vi ne aŭdis ĝin, ĉar vi plendis pri viaj mortigoj tro laŭte. Kial vi ne estingis la fajron? Nu ĉu vi ne komprenas, ke vi faras grandan danĝeron al vi per tio?“

„La militistoj de la komanĉoj devis fari, kio estis decidita per la interkonsilado. Nun oni decidis ion pli saĝan. Vi ja parolos kun ni, ĉu?“

„Kial? Mi estas konvinkita, ke vi denove ne agos laŭ mia konsilo.“

„Ni agos laŭ ĝi.“

„Tion ni ja vidos. Sed bone, mi kvankam ĉio volas provi denove helpi al vi.“

„Do venu kun la Saltanta Cervo al la fajro!“

„Dankon. Mi ne venos tien. Estas ega malprudentaĵo lasi ĝin bruli; ĉar tie la apaĉoj povas vidi vin kaj mortpafi ĉiun laŭvice, kiel Winnetou ja jam mortpafis la Blankan Kastoron kaj la subĉefon. Same mi ne emas disputi kun viaj militistoj. Mi diros, kion mi pensas, kaj tiam vi povos fari, kion vi volas.“

„Do diru ĝin!“

„La apaĉoj troviĝas ne nur je la du eliroj de la valo, sed ili estas en la valo mem. De tie ili instaligis tie antaŭe kaj baris la elirojn. Tiel ili povas turniĝi maldekstren kaj dekstren, tute kiel ili pensas ĝin esti necese. Estas neebla forpeli ilin.“

„Ni ja estas multe pli multaj ol ili.“

„Kiom da militistoj vi jam perdis?“

„La Granda Spirito vokis multajn el ni al si. Jam estas pli ol dekoble dek. Ankaŭ ĉevaloj jam pereis.“

„Do vi ne devas plu fari ion ĉi nokte, ĉar la rezulto de tiu ago estus ĵus same kiel antaŭe. Kaj je la tago la apaĉoj poziciigis tiel, ke ili povos atingi vin per iliaj kugloj, sed vi ne ilin per viaj sagoj. Tiam ankaŭ la trupoj alvenos, kiujn Winnetou venigis, kaj poste estos pli da apaĉoj ol komanĉoj sur la batalejo. La morto certas al vi.“

„Ĉu tio vere estas la opinio de mia frato? Ni agos laŭ via konsilo, se ĝi nur savigas nin.“

„Ke vi parolis pri savigo, vi esperinde komprenis, ke mi pravis, kiam mi nomis tiun ĉi valon embuskilon al la Blanka Kastoro. Kiam mi pensas pri la afero, mi trovas du

manierojn, en kiu savigo povus eble. La unua estas, ke vi esploras, ĉu oni ne jes povas suprengrimpi laŭ la muroj. Sed pri tio vi atendu la tagokomencon. Tiel la apaĉoj vidos vin, kaj atakos vin ekster la valo. Tie ili estas pli fortaj ol vi, ĉar vi ne povos kunpreni viajn ĉevalojn. Do restas nur unu rimedo pro savi vin. Konferencu kun la apaĉoj!“

„Tion ni ne faros!“ la Saltanta Cervo ekkoleris. „La apaĉoj postulus nian morton.“

„Mi povas kompreni ilin, ĉar vi ja donis kaŭzon al ili pro tio. Meze en la paco vi atakis iliajn vilaĝojn, rabis iliajn posedaĵojn, forkondukis iliajn virinojn kaj knabinojn, kaj mortigis iliajn militistojn, aŭ torturis ilin ĝismorte. Poste vi trompis iliajn konferenculojn kaj murdis ilin. Tiaj prihontindaj agoj postulas venĝon, kaj tial ne estas miraklo, ke vi ne povos ekspekti kompaton de la apaĉoj. Vi certe komprenas tion mem, kaj konfesas, ke vi traktis ilin senrespondece.“

Tio estis parolata sincere, tiel sincere, ke la ĉefo silentis kelkan tempon.

„Uŝ!“ li tiam elpuŝis. „Vi diras tion al la Saltanta Cervo, la ĉefo de la komanĉoj, ĉu?“

„Mi dirus ĝin al vi, eĉ se Vi estus la Granda Spirito mem. Estis prihontindaĵo tiu-maniere trakti la apaĉojn, kiuj faris nenion danĝeran al vi. Kial vi mortigis iliajn konferenculojn? Kial vi eliris pro milito kontraŭ ili, kaj donis morton, pereon kaj mizeron al la nenionsciantoj? Respondu al mi!“

„La apaĉoj estas niaj malamikoj.“

„Ne. Ili vivis en paco kun vi, kaj neniu sendito donis al ili la mesaĝon, ke vi elterigis la militakilon kontraŭ ili. Vi certe konscias pri via kulpo. Tial vi ankaŭ diras, ke vi ne povas ekspekti kompaton de ili. Kaj tamen ĝi eblas, establi sufiĉan pacon kun ili. Estas feliĉo por vi, ke ilia estro estas Winnetou, ĉar li ne ardas pri sangofluo. Li estas la sola ĉefo de la apaĉoj, kiu eble povus decidiĝi pri malrigideco kontraŭ vi. Sendu viron al li pro okazigi konferencon. Eĉ mi mem estos preta iri pro animigi lin pri indulgo.“

„La komanĉoj pli ŝate volas ekmorti, ol peti la apaĉojn pri indulgo.“

„Nu, estas afero via. Mi nun diris mian konsilon al vi. Ĉu li agos laŭ ĝi aŭ ne, tio estas egala al mi.“

„Ĉu mia frato ne scias alian solucion? Li parolas pro la apaĉoj, do li estas amiko de ili.“

„Mi estas amiko de ĉiuj ruĝaj viroj, tiel longe ili ne agas malamikece kontraŭ mi. La apaĉoj ne estis kaŭzintaj la plej etan suferigon al mi. Kial mi tiukaze estu ilia malamiko? Sed vi volis aresti nin. Nun konsideru, kiu havas pli grandan rajton pri nia amikeco, ili aŭ vi!“

„Vi surhavas la kalumeton kaj la medicinsaketon de la Saltanta Cervo, do tio, kion vi diras, estas ĵus tiel, kvazaŭ ili estus liaj vortoj. Tial li ne povas doni al vi la respondon, kiun li volus doni. Via konsilo ne taŭgas. Per ĝi vi havas la intencon doni nin en la manojn de la apaĉoj. Ni nun scias mem, kion ni faru.“

„Nu, se vi scias tion, ĝi bonas. Nia afero estas je la fino, kaj al ni nenio plu estas piparolenda.“

„Jes, ni estas je la fino“, la komanĉo grumblis. „Sed bone memorigu, ke vi estas nia malamiko, malgraŭ la savo, en kiu vi nun ankoraŭ estas. Vi ne rajtas teni mian kalumeton kaj mian medicinon. Vi devos redoni ilin antaŭ ni forlasos tiun ĉi lokon, kaj tiam la venĝo atingos vin.“

„*Well!* Mi konsentas. Aĵn kion atingu min, mi atendas per granda trankvilo. Vi minacas al Old Death. Mi ripetas, ke nia afero estas je la fino. Vi povas foriri.“

„*Uŝ!*“ la Saltanta Cervo elpuŝis sovaĝe. Tiam li deturniĝis kaj reeniris per malrapidaj paŝoj al la fajro.

„Tiu uloj kondukas kvazaŭ oni bategis sur iliajn kapojn“, Old Death koleris vidante al li. „Ili vere nur povas saviĝi per peti pri paco. Anstataŭ fari tion, ili certas pri ilia supereco. Sed kiel la cirkonstancoj nun estas, Winnetou sole estas kalkulinda kiel cent militistoj. Tion Vi ne kredos, ĉar Vi estas novulo en la sovaĝa okcidento, kaj ne povas scii, kion en certaj cirkonstancoj unu sola brava viro kapablas. Vi ekzemple nur sciu, kion sukcesis tiu juna apaĉo kun sia blanka amiko Old Shatterhand. Ĉu mi jam rakontis pri tiu al Vi?“

Li nun menciis mian nomon la unuan fojon.

„Ne“, mi respondis. „Kiu estas tiu Old Shatterhand?“

„Juna viro kiel Vi, sed tamen — ne pensu malbone pri mi — tute alia ulo kiel Vi. Terenbatas ĉiun malamikon per la pugno, kapablas vetpafi kun la diablo kaj estas ruzegulo super ĉies rango.“

Ĝi mallaŭte susuris malantaŭ ni, kaj mallaŭtigita voĉo diris:

„*Uŝ!* Ĉu Old Death tie ĉi? Tion mi ne sciis. Kiel mi ĝojas pri tio!“

La maljunulo ekstimigite turniĝis kaj ekprenis sian tranĉilon.

„Mia maljuna blanka frato lasu sian tranĉilon en la zono!“ la voĉo pluparolis. „Li ja certe ne volas piki Winnetoun.“

„Ĉu Winnetou? *Behold!* Fakte nur Winnetou kapablas kaŝrampi malantaŭ Old Death: on sen esti rimarkata de li. Tio estas majstraĵo.“

La apaĉo alrampis tute kaj respondis, sen sciigi, ke li konis min:

„La ĉefo de la apaĉoj tute ne sciis, ke Old Death estas tie ĉi, alikaze li delonge estus parolinta kun li.“

„Sed vi tie ĉi metiĝis en eksternorma danĝero. Vi devis kaŝiri inter la postenuloj kaj poste ĝis tie ĉi, kaj poste ankaŭ devos iri reen.“

„Ne, tio ne necesas al Winnetou. La palvizaĝoj estas liaj amikoj, kaj li povas doni sian fidon al ili. Tiu ĉi valo estas en la regiono de la apaĉoj kaj ili faris el ĝi embuskilon por malamikoj, kiuj volas envadi en nian landon. Tiu rokmuŝoj ne estas tiel negrimpeblaj, kiel ili ŝajnas. La apaĉoj pretigis malvastan vojon, kiu iras ronde ĉirkaŭ la valo en la alteco de pluraj viroj. Per la helpo de lazo oni facile povas iri supren kaj malsupren. La komanĉoj estis logitaj en tiub ĉi embuskon per niaj esploristoj, kaj ili pereu en ĝi.“

„Ĉu ilia morto estas decidita?“

„Jes. Winnetou aŭdis vian interparolon kun la ĉefo, kaj ekkonis per ĝi, ke vi inklinas al la flanko de la apaĉoj. Vi diris, kion la komanĉoj fifaris al ni, kaj komprenas, ke ni vengos tiun multoblan murdon.“

„Sed ĉu fluu riveregoj da sango pro tio?“

„Vi aŭdis mem, ke la komanĉoj nek konfesas iliajn krimojn, nek volas fari, kion vi konsilis al ili, kaj kion ankaŭ la prudento estus ordonanta al ili. Tiel ilia sango fluu. La apaĉoj faros avertan ekzemplon, kiel ili punas la perfidon. Tion ili devas fari, pro esti sava antaŭ ripetoj de tiaj fiagoj.“

„Estas terure. Sed mi ne povas ŝanĝi tion. Mi ne havas kaŭzon ĉiam denove doni mian konsilon al oreloj, kiuj kredas, ke ili ne bezonas ĝin.“

„Vi refoje ne estus aŭskultata. Winnetou konkludis per viaj vortoj, ke vi posedas la sanktaĵojn de la ĉefo. Kiel vi haviĝis ilin?“

Old Death rakontis, kaj Winnetou koncize decidis:

„Ĉar vi promesis al li redoni ilin, vi devas fari tion. Vi redonu ilin ĵus nun, kaj poste venu al ni. Vi estos akceptataj kiel amikoj ĉe ni.“

„Ni venu al vi ĵus nun, ĉu?“

„Jes. Post tri horoj alvenos pli ol sescent militistoj de la apaĉoj tie ĉi. Multaj el ili havas pafilojn. Iliaj kugloj traos la tutan valon, kaj viaj vivoj me plu savos.“

„Sed kiel ni atingos vin?“

„Old Death demandas tion, ĉu?“

„Hm, jes! Ni surĉevaliĝos, kaj rajdos al la fajro. Tie mi redonos la sanktaĵojn al la ĉefo, kaj tiam ni forŝtormos, al la apaĉoj. La gardistojn de la komanĉoj ni facile preterrajdos. Sed kiel ni povos iri trans la baroj?“

„Tre facile. Atendu nur dek minutojn plu, kiam Winnetou estos foririnta ĝis vi ekiras! Tiam li staros dekstre de la eliro de la valo kaj akceptos vin.“

La apaĉo malaperis.

„Nu, kion Vi diras nun?“ Old Death demandis nin.

„Eksternorma viro!“ Lange entuziasmiĝis.

„Ne estas dubo pri tio. Se tiu viro estus blankulo, soldato, li facile sukcesus estiĝi batalestro. Kaj ve al la blankuloj, se li ekhavis la ideon kunigi la ruĝulojn pro batali pro iliaj justaj rajtoj. Sed li amas la pacon kaj scias, ke la ruĝuloj malgraŭ ĉio estas dediĉataj al la perejo; li ŝlosis la teruran ŝarĝon de tiu konvinko silente en sian bruston. — Nu, ni do atendu dek minutojn!“

Ĝi restis tiel silente en la valo, kiel ĝi estis estinta dum la pasinta duona horo. La komanĉoj ankoraŭ interkonsilis.

Post la donita paŭzotempo Old Death stariĝis kaj surĉevaliĝis.

„Faru ekzakte, kion mi faras!“ li diris.

Per malrapidaj paŝoj ni rajdis al la restejo.

La cirklo de la komanĉoj malfermiĝis kaj ni direktigis nian ĉevalon al la mezo. Se la vizaĝoj ne estus ŝminkitaj, ni certe estus leginta plej egan surpriziĝon en iliaj vizaĝoj.

„Kion vi volas tie ĉi?“ la ĉefo demandis salte stariĝante. „Kial vi venas surĉevale?“

„Ni venas kiel rajdantoj, pro doni honorigon al la bravaj kaj saĝaj militistoj de la komanĉoj. Ĉu vi interkonsilis? Kion vi faros?“

„La interkonsilado ne jam estas je la fino. Sed deĉevaliĝu! Vi estas niaj malamikoj, kaj ni ne povas toleri, ke vi estas sur viaj ĉevaloj. Aŭ ĉu vi venas pro redoni la sanktaĵojn de la Saltanta Cervo?“

„Ĉu tio ne estus agate tre stulte de mi? Vi ja diris, ke ekde la momento, je kiu vi rehavas vian posedaĵon, estu malamikeco inter vi kaj ni, ĝis ni ekmortos sur la torturofosto, ĉu?“

„Tiel ĝi estos. La ĉefo diris ĝin, kaj li plenumas sian vorton. La kolero de la komanĉoj neigos vin!“

„Ni timas antaŭ tiu kolero tiel malmulte, ke mi komencigos la koleron ĵus nun. Jen vi havas viajn aĵojn! Kaj nun vidu, kion vi povas fari al ni!“

La maljunulo ŝiris la du aĵojn de sia kolo kaj ĵetis ilin for de si. Samtempe li donis la spronojn al sia ĉevalo, tiel ke ĝi faris egan salton trans la fajro kaj ŝiris grandan disigon transe en la aro de la komanĉoj. Hektor, la negro, estis la unua malantaŭ li. Li terenrajdis la ĉefon. Ni aliaj tri tuj sekvis. Pluraj komanĉoj estis terenrajdataj, ankaŭ unu el la gardistoj, kiuj ekstere estis sur la vojo de la antaŭenŝtormanta Old Death. Tiam ni rajdegis trans la ebena herbejo, sekvata de nepriskribebla kolerkriado de la komanĉoj.

„Uĵ!“ voĉo nun vokis al ni. „Haltu! Jen staras Winnetou!“

Ni haltigis la ĉevalojn. Antaŭ ni staris pluraj apaĉoj, kiuj transprenis niajn ĉevalojn, kiam ni estis deseliĝintaj. Winnetou gvidis nin al la malvastaĵo, kiu kondukis el la valo. Tie oni jam estis pretiginta interspacon, tielke ni kaj ankaŭ la ĉevaloj povis transiri unuope.

Kiam la barilo estis malantaŭ ni, la eliro iĝis pli vaste, kaj baldaŭ ni vidis helan brilon. La malvastejo malfermiĝis, kaj nun ni ekvidis ete brilantan ardaĵon, ĉe kiu kaŭris du ruĝuloj kun rostostango. Ili foriĝis respektoplene, kiam ni proksimiĝis. Ankaŭ la aliaj apaĉoj foriris, kiam ili estis fiksligintaj niajn ĉevalojn. Kelkan distancon for paŝtiĝis tuta aro de ĉevaloj, ĉe kiu staris gardistoj.

„Miaj fratoj sidiĝu ĉe la fajro“, Winnetou diris. „Mi lasis rosti pecon da lumbo de bubalo. Ili povas manĝi, ĝis mi revenos.“

„Ĉu vi forestos longe?“ Old Death demandis.

„Ne, Winnetou iru reen en la valon. La komanĉoj povus igata de kolero pri via fuĝo, ke ili proksimiĝos al la militistoj de la apaĉoj. Tiukaze la ĉefo donos kelkajn kuglojn al ili.“

Li foriĝis. Old Death ĝuante sidiĝis ĉe la fajro, elzonigis la tranĉilon kaj ekzamenis la rostaĵon. Ĝi estis bonega. La maljunulo kaj mi ne jam tute ne estis manĝintaj ion, kaj ankaŭ la aliaj estis nur gustumintaj la ĉevalaĵon de la komanĉoj. La granda lumbaĵo baldaŭ malgrandiĝis. Tiam Winnetou revenis, li vidis al mi demande, kaj mi komprenis lian vidon. Li volis scii, ĉu li ankoraŭ agu, kvazaŭ li ne konus min. Tial mi ekstaris de la fajro, kaj etendis ambaŭ manojn al li.

„Mia frato Winnetou vidas, ke ne necesis al mi iri al la Rio Pecos pro renkonti lin. Mia koro ĝojas, ke mi vidis lin jam tie ĉi.“

Ni ĉirkaŭbrakis unu la alian. Kiam Old Death vidis tion, li mirigite demandis:

„Kio estas tio? Vi jam interkonas, ĉu?“

„Li estas mia blanka frato Old Shatterhand“, la apaĉo klarigis.

„Old Shat—ter—hand, ĉu?“ la *scout* vokis mirigite. „Nu, tiukaze Vi trompis min maljunan vulpon, treege, kvankam mi ja jam delonge sciis, ke tiu juna sekretfaristo ne estis la *greenhorn*, kiun li ŝate volas esti. Sed ke li estas Old Shatterhand, pri tio mi fakte ne estus pensinta eĉ ensonĝe. Pro tio li estis aginta multe pli ofte tro stulte! Certe mi ja eldiris multe tro malmulte antaŭe ĉe la Elm Creek, kiam mi diris, ke vi kapablas multe pli ol Vi ŝajnigas. Vi fia trompisto, Vi!“

Ni lasis lin en sia mirado, ĉar Winnetou devis rakonti al mi multon.

„Mia frato Ŝarlih scias, ke mi devis iri al la Fort Inge. Tie mi eksciis —“

„Mi jam scias ĉion“, mi interrompis lin. „Kiam ni havos pli da tempo, mi diros al vi, kiel ni eksciis ĝin. Nun mi sciu antaŭ ĉio, kie estas la dek palvizaĝoj, kiuj estis ĉe la komanĉoj, kaj transiris al vi kun ciaj du esploristoj, kiuj deklaris sin esti topioj.“

„Ili foriris.“

„Ĉu foriris? Kien?“

„Al Chihuahua, al la trupoj de Juárez.“

„Jam delonge, ĉu?“

„Jes. Ili ege hastis, ĉar kun la komanĉoj ili devis fari longan kromvojon. Ili volis regajni la perditan tempon.“

„Tio estas malbona bato al ni, ĉar inter ili estis la du viroj, pri kiuj mi parolis al ci en Matagorda.“

„Uf, uf! Tion Winnetou ne sciis. Laŭ iliaj klarigoj ili devis atingi Chihuahua:n ĝis certa tago, kaj estis perdintaj multan tempon. Winnetou amas Juárez:on, tial li helpis al ili foriri tre baldaŭ. Li donis al ili bonajn ĉevalojn, mangoprovizon kaj la du ŝajngintajn topiojn kiel gvidojn, kiuj scias ekzakte la vojon al Chihuahua trans la Mapimi. La palvizaĝoj diris, ke ili ne devis perdi unu minuton plu.“

„Eĉ tio! Bonaj ĉevaloj, mangoprovizoro kaj prifidindaj gvidoj! Mi jam tenis tiun Gibson en la mano, nun li sukcesos fuĝi de mi!“

La apaĉo pripensis kelkan tempon, kaj tiam diris:

„Winnetou faris egan eraron, sen ĝin scii, sed li rebonigos tion. Gibson reestos en cia mano. La misio, kiun Winnetou devis plenumi en Matagorda estas finigita. Tuj kiam la komanĉoj estos punitaj, li liberas, kaj akompanos vin. Vi havu la plej bonajn ĉevalojn, kaj se okazos nenio neekspektita, ni estos atingitaj la blankulojn jam je la mezo de la dua tago.“

Apaĉo venis kurante el la valo kaj anoncis:

„La komanĉaj hundoj estingis la fajron kaj foriĝis de la restejo. Ili planas atakon.“

„Ili estos reenbatataj kiel antaŭe“, Winnetou respondis. „Se miaj blankaj viroj volas kuniri, la apaĉo starigos ilin tien, kie ili povos aŭskulti ĉion.“

Ni tuj stariĝis. Li kondukis nin reen al la malvastejo, ĝis antaŭ la baro. Tie li donis lazon, kiu pendis de la roko, en la manon de Old Death.

„Grimpu supren laŭ tiu ŝnuro, dekoble alte kiel altas viro! Tie vi trovos arbedetojn, kaj malantaŭ tiuj la vojon, pri kiu mi rakontis al vi. Winnetou ne povas kuniri supren, sed iru al siaj militistoj.“

„Hm!“ la *scout* grumblis. „Grimpi laŭ tiu maldika lazo supren du viraltecojn! Mi ja ne estas simio, kiu lernis grimpi per lianoj.“ Tiam li aligis kun ridetanta vido flanken: „La *greenborn*, kiu fakte nomiĝas Old Shatterhand certe povos fari ĝin pli bone. Nu, ni provu ĝin!“

Li tamen sukcesis ĝin. Mi sekvis lin, kaj ankaŭ la aliaj postvenis, certe nur per malfacileco. El la roko tie kreskis arbo, ĉirkaŭ kies trunko la lazo estis ĉirkaŭigita. Flanke de ĝi estis arbedetoj, kiuj kovris la vojeton. Ĉar estis tiel malhele, ke ni povis fidi nur piri nia sentkapablo ni paŝis blinde nur per la helpo de la manoj kelkan distancon plu, ĝis Old Death haltis. Apogante sur la roko ni atendis, kion nun

okaziĝos. Estis al mi, kvazaŭ la silento de la morto regis la valon. Ajn kiel mi klopodigis mian orelon, mi povis aŭdi nenion, escepte de mallaŭta flarado, kiu venis el la nazo de Old Death.

„Stultaj uloj, tiuj komanĉoj! Ĉu vi ne pensas same, *Sir*?“ li diris. „Tie transe ĝi odoras kiel ĉevaloj, ĉevaloj, kiuj moviĝas. Tio vere estas tute alia afero kiel ĉevaloj, kiuj staras senmove. Super nemoviĝantaj ĉevaloj laodoro amasiĝas pli dense kaj nebulume; oni povas fakte meti la nazon en ĝin. Sed tuj kiam la ĉevaloj moviĝas, laodoro ankaŭ estas movigata, ĝi pli fajniĝas, aerumiĝas kaj malplipeziĝas. Nun venas tiaj malpezaj ĉevalaerumoj de tie dekstre, kaj al miaj maljunaj oreloj ĝi ankaŭ estis, kvazaŭ ili aŭdis la faleton de ĉevalhufo, mallaŭte kaj obtuze kiel sur herbeja tero. M'taksas, ke la komanĉoj nun mallaŭte kaŝiras al la enirejo, pro traŝtormi tie.“

Tiam ni aŭdis helan voĉon voki:

„*Ti-tŝi!*“

Tiu vorto signifas ‚nun‘. En la sekvanta momento krakis du pafoj — la arĝentpafilo de Winnetou. Sekvis revolveraj pafoj. Nepriskribebla kriado eksonis de malsupre al ni. Laŭtaj indianaj vokoj sonis akre tra la valo; tomahokoj tintis. La batalado estis ekmuĝinta.

Ĝi ne daŭris longe. La spirado kaj la blekado de la ĉevaloj, kaj la kolerkriado de la komanĉoj estis ĉiam pli sublaŭtigata de la venka ‚*Ivivivivivi*‘ de la apaĉoj. Ni aŭdis, ke la embuskitoj cedis reen per hasta fuĝo. Iliaj paŝoj kaj la hufsonoj de iliaj ĉevaloj malproksimiĝis al la mezo de la valo.

„Ĉu mi ne antaŭdiris ĝin?“ Old Death diris. „La apaĉoj defendiĝas bonege. Ili pafas iliajn sagojn kaj pikas per iliaj lancoj el sava kaŝejo. La komanĉoj staras tiel dense amasiĝinte, tiel ke ĉiu sago, ĉiu lanco, ĉiu kuglo trafas. Kaj nun, kiam la malamikoj cedas reen, la apaĉoj sufiĉe saĝas ne sekvi ilin. Ili restas en ilia kaŝejo, ĉar ili scias, ke la komanĉoj ne sukcesos fuĝi el la valo. Do kial kuri malantaŭ ili?“

La komanĉoj nun agis laŭ konsilon de la *scout* en tiu aspekto, ke ili nun kondukis silente post la refoja malsukceso. Ilia kriado estis ĉesiĝinta, kaj ĉar la fajro ne brulis plu, ili ne sciigis iliajn malamikojn pri iliaj moviĝoj. Ni atendis kelkan tempon plu. Nenio okazis. Tiam ni aŭdis la mallaŭtigitan voĉon de Winnetou malsupre de ni.

„Miaj blankaj fratoj povas reveni malsupren. La batalo finiĝis, kaj ankaŭ ne rekomenciĝos denove.“

Ni do iris reen al la lazo, kaj grimpis malsupren laŭ ĝi. Tie staris la ĉefo, kun kiu ni paŝis reen eksteren al la fajro.

„La komanĉoj nun provis ĝin je la alia flanko“, li klarigis. „Ili same malsukcesis. Ili estas daŭre rigardataj, kaj povas fari nenion, sen ke Winnetou ekscios ĝin. La apaĉoj sekvis ilin, kaj nun kuŝas sur la herbejo laŭ longa lineo, kiu iĝas de unu flanko de la valo al la alia, pro arde rigardi la kontraŭulojn.“

Dum la apaĉoj diris tion, li tenis sian kapon klinite dekstren, kvazaŭ li aŭskultis ion. Tiam li eksaltis, tiel ke la fajro hele lumigis lian figuron.

„Kial ci faras tion?“ mi demandis al li.

Li montris eksteren en la malhelan nokton.

„Winnetou aŭdis, ke ĉevalo faletis tie sur ŝtona tero. Venas rajdanto, unu el miaj militistoj. Li volas deĉevaliĝi, pro esplori kiu sidas tie ĉi ĉe la fajro. Tial mi ekstaris, pro ke li povas ekvidi jam de malproksime, ke Winnetou troviĝas tie ĉi.“

Lia delikata aŭdokapablo ne estis trompinta lin. Rajdanto trote alvenis, haltigis sian ĉevalon ĉe ni kaj deseliĝis. La ĉefo akceptis lin kun ne tre amikeca mieno. Li riproĉis lin pro la bruoj.

La riproĉito jen staris en rekta, sed tamen respektplena teniĝo, libera indiano, kiu tamen ŝate agnoskas la pli granda talento de sia estro.

„Ili venas“, li raportis.

„Kiom da ĉevaloj?“

„Ĉiuj. Ne mankas unu militisto. Kiam Winnetou vokas, neniuj apaĉoj restas ĉe la virinoj.“

„Kiel proksime ili estas de tie ĉi?“

„Ili venos je la komenco de la tago.“

„Bone. Konduku vian ĉevalojn al la aliaj, kaj sidiĝu ĉe la gardistoj pro ripozo!“

La viro obeis. Winnetou residiĝis al ni, kaj ni rakontu al li pri nia restado en la Estancia del Caballero, kaj tiam ankaŭ pri la okaziĝoj en La Grange. Dum tio mi ankaŭ montris al li la totemon de la Bona Viro. Per tio la tempo pasiĝis tre rapide. Neniu pensis pri dormo. La apaĉoj aŭskultis nian raportadon kaj nur intertempe faris koncizan komenton aŭ demandon. Tiel la nokto ĉiam pli finiĝis, kaj komencis la matena krepusko. Tiam Winnetou etendis sian manon okzidenten.

„Miaj blankaj fratoj vidu, kiel ĝustatempaj la militistoj de la apaĉoj estas. Jen ili venas.“

Mi vidis en la montritan direkton. La nebulo ŝvebis kiel griza, senonda lago en la okcidento, kaj ŝovis sian netravedblajn amasojn golfece inter la montojn. El tiu nebula maro aperis rajdanto, kiun sekvis multaj aliaj en longa unuopa vico. Kiam la unua ekvidis nin, li haltis momenton. Tiam li rekonis Winnetoun, kaj venis al ni per mallonga trotado. Estis ĉefo, ĉar li havis agloplumon en sia hararo. Kiam la tuta trupo haltis antaŭ ni, mi vidis, ke ĉiuj tiuj militistoj apartenis al unu el la apaĉotriboj, kun kiuj mi ne jam estis en kontakto. Neniu el tiuj rajdantoj havis veran bridilaron. Ili ĉiuj kondukis iliajn ĉevalojn nur per kolbrido, sed tamen la direktigo de la bestoj, kiuj nun kuris al ni en rapida galopo, pro stariĝi antaŭ ni en kvinobla vico, tiel certe kiel tiu de eŭropa kavalerio. La plejmultaj el ili estis armitaj per pafiloj, nur malmultaj havis lancojn, arkojn kaj saguojn. La estro interparolis mallongan tempon kun Winnetou. Tiam la ĉefo faris mansignon kaj tuje ĉiuj rajdantoj deĉevaliĝis. Ĉiuj, kiuj ne havis pafilon ekprenis la ĉevalojn pro gardi ilin. La aliaj paŝis en la malvastejon. La lazo, per kiuj ni estis grimpintaj al la vojeto ankoraŭ pendis tie, kaj mi vidis, ke unu post la alia svingiĝis supren laŭ ĝi. Ĉi ĉio okaziĝis tiel senbrue kaj rapide, kvazaŭ ĝi estis interkonsentigita jam longe kaj detale. Winnetou trankvile jen staris, pro rigardi atente la movojn de siaj anoj. Kiam la lasta militisto estis malaperinta, li turniĝis al ni.

„Miaj blankaj fratoj nun ekscios, ke la militistoj de la komanĉoj estos pereantaj, kiam Winnetou ordonas tion.“

„Ni estas konvinkitaj pri tio“, Old Death certigis. „Sed ĉu Winnetou vere volas verŝi la sangon de tiom multaj homoj?“

„Ĉu ili meritas ion alian? Kion faras la blankaj viroj, kiam unu el ili estis mortiginta? Ĉu ili ne serĉas la mortiginton? Kaj kiam li estas trovita, iliaj ĉefoj kuniĝas kaj interkonsiladas, pro eldiri la juĝon pri la murdisto kaj lasi lin mortigata. Ĉu vi povas riproĉi la apaĉojn, kiam ili faras la samon?“

„Jes, ni punas la murdiston, per ke ni mortigas lin. Sed vi volas lasi mortpafi ankaŭ tiujn, kiuj ja ne ĉeestis, kiam viaj vilaĝoj estis atakataj.“

„Ili havas la saman kulpon, ĉar ili estis konsentinta pri tio. Ili ankaŭ ĉeestis, kiam la kaptitaj apaĉoj devis ekmorti sur la torturofosto. Ili nun estas la edzoj de niaj virinoj kaj filinoj, kaj la posedantoj de nia posedaĵoj, de niaj ĉevaloj, kiuj estis rabitaj de ni.“

„Sed vi ne povas nomi ilin murdistoj!“

„Winnetou ne scias, kion Old Death volas. Ĉe liaj fratoj estas ankaŭ aliaj agoj escepte de murdo, kiuj estas punataj per la mortigo. La okcidentulo pafas ĉiun ĉevalŝtelinton teren. Kiam oni rabas la edzinon aŭ la filinon de blankulo, li mortpafas ĉiujn, kiuj rilatis al tiu ago. Tie en la valo restas la rabintoj de niaj virinoj, knabinoj kaj ĉevaloj. Ĉu ni eble donu al ili pro tio tion, kion la blankuloj nomas ordeno?“

„Ne, sed vi povas pardoni al ili, kaj repreni viajn posedaĵojn.“

„Oni reprenas ĉevalojn, sed ne virinojn. Kaj pardoni, ĉu? Mia frato ĵus parolas kiel la blankuloj, kiuj ĝenerale postulas tion de ni, kies malon ili mem ĉiam faras. Ĉu la blankuloj pardonas al ni? Ĉu ili ĉiel povas pardoni ajn ion al ni? Ili venis al ni kaj forprenis nian landon. Ajn kiam iu ĉe vi translokigas limŝtonon, aŭ kontraŭleĝe mortigas beston de la arbaro, oni metas lin en la plej malhelan konstruaĵon, kiun vi nomas malliberejo. Sed kion vi faras al ni? Kie estas niaj prerioj kaj savanoj? Kie estas la aroj de niaj ĉevaloj, de la bubaloj kaj la aliaj bestoj, kiuj estis niaj posedaĵoj? Vi venis al ni en grandaj amasoj, kaj kiu knabo kunportis pafilon, pro rabi la viandon de ni, kiun ni bezonis pro pluvivi. Oni forŝiris unu landon post la alian sen ia rajto. Kaj kiam la ruĝa viro defendas sian posedaĵon, li estis nomata murdisto, kaj oni mortpafas lin kaj liajn anojn. Vi volas, ke mi pardonu al miaj malamikoj, al la atakintoj, al kiuj ni ne estis farintaj ian danĝeron. Kial vi do ne pardonas al ni, al kiu vi faras ĉian malbonan, senke ni estis doninta kaŭzon al vi pro tio? Kiam ni defendiĝas, tio estas nia rajto. Sed vi punas nin pro tio per la pereco. Kion vi dirus, se ni venus al vi, pro devigi nin al niaj manieroj kaj kutimoj? Vi estus mortigantaj nin ĝis la lastan viron, aŭ metantaj nin en viajn frenezulejojn. Kial ni ne rajtas agi en la sama maniero? Sed tiam vi diras, ke la ruĝa viro estus sovaĝulo, pri kiu oni sentu nek simpatie nek kompatie; li neniam estus akceptinta bonedukon, kaj tial devas malaperi. Ĉu vi pruvis per via konduto, ke vi estis bonedukitaj?

Vi devigas nin akcepti vian religion. Montru ĝin pli bone al ni! La ruĝaj viroj ĉiuj adoras la Grandan Spiriton en la sama maniero. Sed ĉiu el vi volas feliĉiĝi per alia maniero. Mi konas kredon de la kristanoj, kiuj bonis. Tiun instruis la piaj *patres*, kiuj venis en nian landon sen voli mortigi aŭ forpeli nin. Ili konstruis misiejojn ĉe ni kaj instruis niajn gepatrojn. Ili ĉirkaŭmigris en amikeco kaj instruis al ni ĉion, kio bonas

kaj utilas. Sed tio ŝanĝiĝis. La piaj viroj devis cedi kun ni, kaj ni devis vidi ilin ekmorti, senke ni ricevis anstataŭon pro ili. Anstataŭ ili nun venas alikredantoj en cent specoj. Ili plenĵetas niajn orelojn per vortoj, kiujn ni ne komprenas. Ili internomas mensogistoj, kaj tamen deklaras, ke ni ne povus atingi la Ĉiamajn Ĉasejojn sen ili. Kaj kiam ni deturniĝas de ili, tedite per ilia disputaĉado, ili minacas pereon kaj veon al ni kaj diris, ke ili volas skui la polvon de iliaj piedoj kaj lavi iliajn manojn en senkulpeco. Tiam ĝi ne daŭras longe, kaj ili alvokas la palvizaĝojn, kiuj envadas ĉe ni kaj forprenas la paŝtejojn de niaj ĉevaloj. Kiam ni tiam diras, ke tio ne okazu, venas la ordono, ke ni denove formigru.

Tio estas la respondo, kiun mi devas doni al vi. Ĝi ne plaĉos al vi, sed vi en mia situacio certe parolus eĉ pli alimaniere. *Hough!*“

Post tiu indiana certiga vorto li turniĝis de ni, kaj faris kelkajn paŝojn flanken, kie li stariĝis, rigardante al la horizonto. Li estis interne ekscitita, kaj volis regajni sian memregon. Tiam li returniĝis al ni, kaj diris al Old Death:

„Mi faris longan paroladon al mia frato. Li certe konsentas kun mi, ĉar li estas viro, kiu pensas juste. Tamen mi volas konfesi al li, ke mia koro ne aspiras pri sango. Mia animo estas pli milda, ol estis miaj vortoj. Mi pensis, ke la komanĉoj estus sendintaj intertraktanton al mi. Sed ĉar ili ne faris tion, mi ne sentu kompaton pri ili. Sed mi tamen volas sendi viron al ili, kiu parolu kun ili.“

„Tio ĝojas min“ Old Death vokis. „Mi estus forlasinta tiun lokon nur en tre malgaja animstato, sed tiel multaj homoj estus mortigintaj sen ia provo savigi ilin. — Sed ĉu vi ankaŭ scias, ke ankoraŭ pli multaj komanĉoj estas ekspektendaj?“

„Winnetou scias. Li ja devis kaŝiri kun Inda-niŝo inter ili. Sed ja estas nur cent, kiuj postvenos. Ni embuskigos ilin en la sama valo, kaj neigos ilin kiel la aliajn, se ili ne libervole kapitulacos.“

„Do zorgu, ke ili ne venos tro frue! Vi finigu la aferon pri tiuj ĉi, antaŭ la aliaj alvenos.“

„Winnetou ne timas. Sed li hastos.“

„Ĉu vi havas viron, kiu povas intertraktadi kun la komanĉoj?“

„Winnetou havas multajn; sed pleje plaĉos al li, se lia frato Old Death volus fari tion.“

„Mi ŝate transprenos la taskon. Estus plej bone, ke mi antaŭiras mallongan vojon kaj vokos ilian ĉefon al mi. Kiujn kondiĉojn vi postulas de ili?“

„Ili donu al ni pro ĉiun mortigitan kvin, kaj pro ĉiun torturiton dek ĉevalojn.“

„Tio estas justa, sed ekde ne plu ekzistas grandaj aroj, ĉevalo ne estas facile akirebla.“

„Kion ili alie estis rabintaj de ni, ni postulas reen“, Winnetou ignoris la kontraŭon de la maljunulo. DKrome ili liveru al ni tiom da junaj virinoj, kiom ili forkaptis de ni virinojn kaj knabinojn. Ankaŭ vi reenpostulas la infanojn, kiujn ili kunprenis. Ĉu vi pensas, ke tio estas tro drakone?“

„Ne.“

„Fine ni postulas, ke oni difinu lokon, kie kuniĝos la ĉefoj de la apaĉoj kaj komanĉoj pro interkonsenti pacon, kiu daŭru almenaŭ tridek somerojn kaj vintrojn.“

„Se la komanĉoj akceptos tion, mi gratulos al ili.“

„Tiu loko estu la valo, kie nun troviĝas iliaj militistoj. Tien ĉi ankaŭ estu portata ĉion, kion ili liveru. Ĝis ĉio, kion ni postulas, estos alportinta, la komanĉoj, kiuj hodiaŭ kapitulacu, estos niaj kaptitoj.“

„Mi pensas, ke viaj postuloj ne estas tro multaj, kaj mi transdonos ilin.“

La maljuna *scout* surŝultrigis sian pafilon kaj detranĉis folihavan branĉon, kiu servis la li kiel signo de intertraktanto. Tiam li malaperis kun la apaĉo en la malvastejo. Tute certe ĝi ne estas sen danĝero al li proksimiĝi nun al la komanĉoj; sed la maljunulo ne konis timon.

Kiam Winnetou estis konvinkiĝinta, ke la *scout* interparolis kun la estro de la komanĉoj, li revenis al ni kaj kondukis nin al la laste alvenintaj ĉevaloj. Ankaŭ estis estinta nerajdintaj bestoj inter ili, parte de pli bona raso, kiujn oni volas ne eluzi kaj nur tiam ekuzi, kiam ĝi graviĝis efikigi eksternormajn kapablojn, sed parte ankaŭ bestoj de averaĝa kvalito, kiuj estis kunirigintaj kiel anstataŭaj ĉevaloj.

„Winnetou promesis al siaj fratoj doni al ili pli bonajn ĉevalojn“, li diris. Li nun elektos ilin. Mia frato Ŝarlih ricevu unu el miaj propraj ĉevaloj.“

Li elektis kvin ĉevalojn. Mi estis ravigita per la belega besto, kiun li alvenigis al mi. Ankaŭ la du Lange:oj kaj Hektor tree ĝojis. La nigrulo brile videbligis ĉiujn siajn dentojn.

„Ho, ho, kvala kavalo Hektor akviras! Esas nigra kvale Hektor ed esas anke splendida tote kvale Hektor. Konvenas tre bone kune, kavalo e Hektor. Ho, ho!“

Certe estis pasiĝintaj tri kvaronajn horojn, kiam Old Death finfine revenis. Lia mieno estis tre serioze. Li estis havinta la certan konvinkon, ke la komanĉoj estus akceptintaj la postulojn de Winnetou, sed la vizaĝa esprimo de la *scout* ekspektigindis la malon.

„Mia frato diros al mi tion, kion mi supozis“, la apaĉo diris. *La komanĉoj ne volas, kion volas Winnetou.“

„Bedaŭrinde ĝi estas tiel.“

„La Granda Spirito donis blindecon al ili, pro puni ilin pro kion ili faris. Li ne volas, ke oni sentu kompaton pri ili. Kiujn kaŭzojn ili havas?“

„Ili kredas, ke ili ankoraŭ povos venki.“

„Ĉu vi diris al ili, ke alvenis pli ol kvincent apaĉoj plu?“

„Ankaŭ tion. Ili ne kredas ĝin. Ili mokis pri mi.“

„Do ili estas dediĉataj al la morto, ĉar iliaj aliaj militistoj venos tro tarde.“

„Mi sentas malvarmecon ĉie, kiam mi pensas, ke tiel multaj homoj estu forigataj de la tero dum malmultaj sekundoj!“

„Mia frato pravas. Winnetou konas nek riskon nek timon, sed ankaŭ li sentas tiun malvarmon, kiam li pensas, ke li donu la signon de la neigo. Mi bezonas nur levi la etenditan manon, kaj ĉiuj pafoj ekkrakos. Mi faros unu lastan provon, kaj montros min mem al ili pro paroli kun ili. Miaj fratoj akompanu min ĝis al la baro. Se ankaŭ miaj vortoj estos malatentataj, la Granda Spirito ne koleru kontraŭ mi, ke mi efikigos sian ordonon.“

Ni iris kun li al la nomita loko. Tie li svingiĝis supren laŭ la lazo, kaj paŝis sur la vojeto en rekta teniĝo, tiel ke la komanĉoj povis vidi lin. Li ne jam estis irinta longe,

kiam ankaŭ jam sagoj siblis al li. Sed ili ne trafis lin, ĉar ili flugis tro mallonge. Pafo krakis. La apaĉo trankvile plupaŝis, kvazaŭ li tute ne estis rimarkinta la kuglon, kiu puŝiĝis sur la rokon flanke de li. Tiam li haltis, kaj ekparolis. Kvin minutojn li parolis laŭte kaj emfaze. Meze en la parolado li levis la manon, kaj tuj ni vidis, ke ĉiuj apaĉoj ĉirkaŭe, ĝis kie niaj vidoj povis etendi, ekstaris de la tero. Tiel la komanĉoj ekkonu, ke ili estis embuskitaj ĉirkaŭe de superforta malamiko. Tio estis sincere agata de Winnetou, lia lasta provo motivigi la kontraŭulojn pri kapitulaco. Tiam li pliparolis. Subite li surteriĝis, tiel ke lia korpo tute malaperis, kaj samtempe krakis dua pafo.

„La Saltanta Cervo pafis al li. Tio estis lia respondo“ Old Death diris. „Winnetou vidis, ke tiu levis sian pafilon, kaj ĵetiĝis sur la teron en la momento, kiam ĝi estis direktigita al li. Nun li — vidu, vidu!“

Tiel rapide, kiel Winnetou estis malaperinta, tiel rapide li nun restariĝis. Li alŝultrigis sian arĝentpafilon kaj lanĉis. Laŭta kriado de la komanĉo respondis al lia pafo.

„Li terenpafis la komanĉoĉefon“ Old Death klarigis.

Nun Winnetou denove levis la brakon, etendante la manon ebene, horizontale. Ni vidis ĉiujn apaĉojn alŝultrigi iliajn pafilojn. Multe pli ol kvarcent pafoj krakegis.

„Venu, *mes'sur.oj!*“ la maljunulo komentis. „Tion ni ne volas rigardi. Tio estas tro indiane, eĉ al miaj maljunaj okuloj, kvankam mi diru, ke la komanĉoj meritigas ĝin. Winnetou faris ĉion eblan pro eviti la ekstremaĵon. M'taksas, ke ankaŭ Old Shatterhand, la indianamiko, ne volas spekti tion. Venu!“

Ni iris reen al la ĉevaloj, kie la *scout* ekzamenis la por li elektitan beston. Ni aŭdis kroman pafaron; tiam eksonis la venkokriado de la apaĉoj. Post malmultaj mintuoj Winnetou revenis al ni. Lia mieno estis ege serioza.

„Laŭtiĝos granda plendo en la tendoj de la komanĉoj, ĉar neniuj el iliaj militistoj revenos. La Granda Spirito decidis, ke niaj mortigitoj estu venĝataj. La malamikoj ne volis ĝin alimaniere, kaj tiel mi ne povis agi alimaniere. Sed mia vido ne volas iri reen en tiun valon de la morto. Kio okazu plu, tion faros miaj militistoj. Mi tuj forrajdos kun miaj blankaj fratoj.“

Duonan horon poste ni ekrajdis, provizite per ĉion necesan. Winnetou krome kunprenis dek bonrajdantajn apaĉojn. Mi sentis feliĉon, ke mi povis forlasi tiun terurigan lokon.